

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

TRIFON
ĤRISTOVSKI
ĈIAM EN
NIAJ KOROJ

•
AL NOVAJ
SUKCESOJ

•
HOMO KUN
GRANDA KORO

•
TELEVIDA
E-FILMO

•
NIAJ
E-VETERANOJ

•
BELETRO
KAJ
POEZIO

•
ENLANDA
MOVADO

•
ESPERANTO
TRA LA MONDO



TRIFON ĤRISTOVSKI

ĈIAM EN NIAJ KOROJ!...



„Kiel komunisto, partia funkciulo kaj multjara sekretario de la partia organizaĵo en lia naskiĝvilaĝo Radotina, kiel publicisto kaj konsilanto de la junularo en sia regiono, Trifon Ĥristovski ankaŭ nun estas ekzemplo de volo, kuraĝo, obstino kaj sciamo.“

TODOR ĴIVKOV

24-an de januaro 1985. Salono „Botevgrad“. Okazis solena kunveno, dediĉita al la 80-jariĝo de la komunisto, ĵurnalisto kaj esperantisto Trifon Ĥristovski. Por honori la memoron kaj agadon de tiu giganto de la homa spirito en urbo Botevgrad, distrikto de Sofio, ĉeestis: la sekretario de CK de BKP Stojan Miĥajlov; la heroo de socialisma laboro, merita aganto de la kulturo kaj veterano-esperantisto Nikola Aleksiev; la frato kaj la fratino de Tr. Ĥristovski — Dimităr kaj Cveta Ĥristovski, geamikoj kaj korespondantoj de

Ĥristovski; gvidantoj de Botevgrad; sociagantoj, ĵurnalistoj kaj multaj civitanoj.

La solenaĵon malfermis kaj gvidis la unua sekretario de la Komunuma Komitato de BKP en Botevgrad d-ro Dimităr Vasilev. Li transdonis al la ĉeestantoj la personajn salutojn de la ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario Todor Ĵivkov.

En sia raporto, dediĉita al Trifon Ĥristovski, Nikola Aleksiev emfazis la signifon de liaj vivo kaj agado por la edukado de nia kreskanta generacio.

Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de CE de BEA, iama korespondanto de Trifon Ĥristovski, enmanigis la E-standardon al Esperantista societo „Trifon Ĥristovski“ en Botevgrad. Li bondeziris al la lokaj esperantistoj esti indaj por sia patrono, esti per vortoj kaj per siaj agoj fidelaj al Trifon Ĥristovski. La prezidanto de la societo Mitrofan Veleŭ — ĉefredaktoro de ĵurnalo „Botevgradski Plamăk“ (Botevgrada Flamo) — dankis pro la montrita fido.

Fine Cvetan Tanev — sekretario de la partia organizo en vilaĝo Radotina, tralegis telegramon en la nomo de la kunveno al k-do Todor Ĵivkov.

La solenaĵo finiĝis per projekciado de la dokumenta filmo „Trifon Ĥristovski“.



La honora prezidantaro



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 54

MARTO

3 • 1985

AL LA JUBILEO — KUN NOVAJ SUKCESOJ

En 1987 la monda socio celebras la centjarigon de la internacia lingvo Esperanto. Lige kun tiu jubileo internaciaj kaj naciaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj preparas specialajn planojn. BEA estas inter la unuaj E-asocioj, kiuj preparis sian jubilean kompleksan programon. Gi estis akceptita en plenkunsido de CE de BEA kaj ampleksas la periodon 1985—1989 t. e. ankaŭ 2 jarojn post la jubileo, por ke oni plene profitu la kreitan festan entuziasmon en la ĉiutaga laboro por plua disvastigo de Esperanto.

La programo „Cent jarojn Esperanto“ estas kompleksa, longdaŭra programo, kies ĉefa celo estas la ebla plej bona preparo de la celebrado de l'100-jariĝo de la Internacia Lingvo. Pri ĝia realigo zorgos speciala Jubilea Komitato ĉe BEA, kiu devas unuigi la fortostreĉojn de CE de BEA, DE de BEA kaj de ĉiuj bulgaraj esperantistoj por digna celebado de la granda datreveno. Por krei favoran socian klimaton por popularigo de la jubileo, estas antaŭviditaj vico da E-aranĝoj, por kies efektivigo la Jubilea Komitato serĉos helpon flanke de kompetentaj ŝtataj instancoj. La laboro por realigo de la programo „Cent jarojn Esperanto“ celas ankaŭ popularigon kaj meritan rekonon de la granda personeco kaj de la faro de d-ro Zamenhof, kies nomo estas por ĉiam ligita kun lia genia kreaĵo — la internacia lingvo Esperanto, kaj kun lia kontribuo por paco en la mondo kaj interkomprenigo de la popoloj. La baza parto de la programo estas direktita al ĉiuj bulgaraj esperantistoj. Krome, oni antaŭvidas aranĝojn speciale por infanoj kaj junuloj. Aliaj aranĝoj, planitaj por la neesperantista publiko, celas propagandi Esperanton kiel rimedon por vastaj internaciaj kontaktoj en la nomo de la paco kaj interkomprenigo de la popoloj.

Ĉiuj aranĝoj en la jubilea programo estas grupigitaj en sep ĉefaj partoj. La unua ampleksas organizajn aranĝojn. Dum la antaŭstarantaj distriktaj jarkonferencoj aŭ en specialaj plenkunsidoj la distriktaj estraroj de BEA devas akcepti siajn kompleksajn programojn konforme

al la specifaj kondiĉoj en ĉiu distrikto. Ankaŭ la sekcioj de BEA devas aprobi siajn programojn, kiujn oni devas akcepti en kunsidoj de la estraroj.

Lige kun la jubileo oni antaŭvidas anonci konkuradon por plej aktiva sekcio, distrikta aŭ societa estraro. Pri la rezultoj de ĝia unua etapo oni raportos dum la 41-a kongreso de BEA.

La dua parto de la programo estas direktita al propagandaj taskoj. Gi antaŭvidas starigon de kontaktoj kun amaskomunikiloj por propagando de la jubileaj aranĝoj. Unu el la ĉefaj taskoj estas ellaboro de memoraĵoj, dediĉitaj al la centjariĝo de Esperanto fare de la entreprenoj ĉe Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Esperantista Kooperativo. Estas planitaj: organizado de grupo de lektoroj, kiuj prelegos lige kun la jubileo; jubilea E-paĝo en iu el la centraj gazetoj; eldono de jubilea numero de „Bulgara Esperantisto“ kaj de kolekto „100 jarojn Esperanto“. La preparo de tiu plej impona jubilea eldonaĵo jam komenciĝis. Grava parto de la programo rilatas la artkreadon kaj la sciencon agadon. Gi ampleksas: preparon de ekspozicio pri BEA, kiu estos prezentita en Sofio kaj en diversaj aliaj loĝlokoj de la lando; esploron de la ebloj pri fando de grupo de interlingvistiko en scienca instituto; eldonadon de materialoj pri la bulgara E-movado; ekspozicion de bulgaraj E-libroj en la lando kaj eksterlande; jubilean televidelsendon; jubilean sciencon sesion kaj multajn aliajn aranĝojn. Tre gravan lokon en la programo okupas la laboro kun junularo kaj infanoj. Partopreno en la Internacia Infana Asembleo „Standardo de la paco“, organizo de Internacia Junulara Laborbrigado; komunaj aranĝoj kun la Palaco de Junpioniroj, jubileaj paĝoj en junularaj kaj infanaj periodaĵoj — tio estas nur kelkaj el la antaŭviditaj programoj en tiu ĉi parto. (Grandan atenton oni turnas ankaŭ al la kultur-amasa laboro). Honore al la jubileo la Plenkunsido de CE de BEA prenis decidon pri plimultigo de la asocia membraro. Oni antaŭvidas multajn komunajn aranĝojn kun amasaj organizaĵoj kaj kreaĵoj

asocioj, organizon fare de IEK de aŭtomarŝo al la urboj sur la Balkana Duoninsulo, en kiuj okazis UEA- kaj TEJO-kongresoj, turistan foirfeston en montodomo „Esperanto ka. La parto pri la agado en internacia skalo antaŭvidas kunlaboron kun E-Asocioj el la balkanaj landoj. Estas planitaj du grandaj aranĝoj: seminario „Esperanto kaj la kulturo“, kaj konferenco kun partopreno de eksterlandanoj, dediĉita al la kontribuo de esperantistoj al la pacbatalo. Krome, en tiu parto troviĝas lokon kunlaborado kun la kulturcentroj de la socialismaj landoj en Sofio, organizado de grupo por la jubilea UK en Varsovio kaj multaj aliaj interesaj iniciatoj. Por realigi tiun ampleksan programon la Jubilea Komitato devas organizi efikan kontrolon. Tial en la sepa — lasta parto de la programo oni antaŭvidas prezenton de periodaj raportoj antaŭ la buroo de la Distriktaj Estraroj kaj antaŭ la Buroo de CE de BEA pri la plenumo de la programo. Sistema kontrolo estas nepre neces!

La plenumo de la kompleksa programo „Cent jarojn Esperanto“ estas tre grava tasko de la Distriktaj Estraroj, de ĉiu aparta E-societo, de la tuta asocia aktivularo. Kompreneble, ne ĉio dependas de ni esperantistoj — precipe tiam, kiam la aktivado estas ligita kun neesperantistaj instancoj. Sed nia entuziasmo, kapablo kaj obstino povas influi kaj instigi al pli aktivaj agoj ankaŭ niajn partnerojn.

Do, ĉiu membro de BEA devas maksimume mobilizi siajn fortojn kaj volon por realigo de la jubilea programo, por ke ni bonvenigu la duan jarcenton de Esperanto kun novaj sukcesoj — garantiĝo por ĝia hela estonto.

DIMITAR PAPAZOV

Konstruu kun ni fortan movadon por Esperanto!

Kiam ni post kelkaj monatoj publikigos la Estraran Raporton pri la jaro 1984, eblas konstati, ke tio estis plurilate tre signifa jaro en la vivo de la Asocio. Krom la vastigo de la Domo de UEA en Roterdamo, tiun jaron aparte markas tre grava vigliĝo de la eldona agado, kiu surmerkatis tutan aron da signifaj verkoj. Inter ili elstaras la impona eldono de *Esperanta antologio*, kiu digne inaŭguras la specialan serion sub la nomo Jubilea Kolekto: Jarcento de Esperanto. La merkato entuziasme akceptis ankaŭ la unuan grandan volumon sub la signo de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto — *Ĉu vi konas la teron?* — kaj la plej novan verkon de d-rino Marjorie Boulton — *Faktoj kaj fantazioj*. Karakteriza por 1984 estis ankaŭ la sukcesa okazigo de la 69-a Universala Kongreso en nova mondparto, en Kanado.

Kion portos al ni 1985? Ni espereble havos tradicie grandan Universalan Kongreson meze de Eŭropo — en Aŭgsburgo. Unu el la tagordaj punktoj, kiujn la Komitato de UEA traktos tie, povus montriĝi aparte signifa por la estonta evoluo de nia Asocio. Temas pri la planoj malfermi la asocian membrecon al tute nova tavolo de la esperantistaro, al tiuj, kiuj pro financaj kialoj ĝis nun ne sukcesis ligi sin al UEA. Se la Komitato aprobas tiurilatajn planojn de la Estraro, ni povas antaŭvi-

di, ke la Asocio renkontos la Centjaran Jubileon kun pliaj miloj da membroj, pli ol ĝi iam ajn antaŭe havis. Ni planas ankaŭ funde revizii la rilatojn inter UEA kaj la aliĝintaj landaj asocioj, tiel ke tiuj rilatoj ne limiĝu al formularoj kaj kotiztranspagoj, sed ke UEA helpu kiom eblas ankaŭ en la solvado de problemoj, kiujn frontas unuopaj landaj organizaĵoj. Konkrete parolante, ni intencas entrepreni ankaŭ kun aliaj landaj asocioj paŝojn similajn al tiuj jam realigitaj en la kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo, kiu dum 1984 reprenis por la enlanda uzo, kun permeso de UEA, la verkojn *Plena analiza gramatiko kaj Esperanta antologio*, kiuj alimaniere neniam sukcesus atingi la ĉinan esperantistaron.

Iasence, eble la plej grava novaĵo, kies realigon ni povas atendi dum la venontaj jaroj, estis legebla en la ĵusa, decembra numero de la revuo *Esperanto*. Ni parolas pri la kelkpaĝa anonco de la nederlanda firmao BSO, kiu dum 1985 dungos plurajn specialistojn pri Esperanto, por daŭrigi sian projekton pri la utiligo de la Internacia Lingvo en la aŭtomata tradukado. Malantaŭ tiu pionira projekto nun ne plu staras nur la menciita firmao, sed ankaŭ la nederlanda registaro, kiu decidis financi la entreprenon.

Ni do povas atendi signifan progreson sur pluraj kampoj de la agado por la Internacia

Lingvo dum la jaro 1985. Eĉ pli bone ol „atendi“ tiun progreson, ni ĉiuj povas kontribui al ĝi, ni ĉiuj povas labori por ke ĝi realiĝu. La preparoj por la Centjara Jubileo en 1987, kaj UEA kiel la ĉefa portanto de tiuj preparoj, meritas la maksimuman atenton de ĉiu unuopa partoprenanto en la tutmonda Esperanto-movado.

Ni havu prosperan kaj atingoriĉan 1985⁺ kun aparta konsidero, ke ĝi estas Internacia Junulara Jaro, kaj ke necesas repruvi la junecon kaj la vigecon de la Movado sojle de nia centjariĝo.

(El la Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA GREGOIRE MAERTENS)

HOMO KUN GRANDA KORO



E-veterano Nikola Aleksiev

Gekamaradoj,

Ni kunvenis por noti la 80-jariĝon de unu rimarkinda bulgaro — Trifon Ĥristovski.

Naskita la 24-an de januaro 1905, li vivis ne plenajn 40 jarojn kaj forpasis la 17-an de majo 1944, nur kelkajn monatojn antaŭ la alveno de la avide atendata de li Libero, por kiu li oferis ĉiujn siajn fortojn.

Trifon Ĥristovski estas ekzemplo de revolucia pensado kaj revolucia agado. Ankaŭ nun, kiam pasis pli ol 40 jaroj post lia morto, li plu instruas al ni kiel realigi la partiajn ordonojn, kiel disvolvi siajn kapablojn por ties revolucia solvado.

En la plej pezaj jaroj de faŝista teroro Trifon Ĥristovski decidis krei grupon de la ĵus fondita legala Laborista Partio. Li estiĝas ĝia partia sekretario kaj restas sur tiu posteno ĝis sia morto. Li estas disvastiganto de ĉiuj proletaj gazetoj, revuoj kaj libroj, verkas artikolojn kaj korespondadojn por ĉiuj progresemaĵoj eldonaĵoj, memstare ellernas la internacian lingvon Esperanto kaj publikigas en tiu lingvo en laboristaj E-eldonoj ĉe ni kaj en alilando artikolojn pri la peza stato kaj la bataloj de la bulgaraj laboristoj, vilaĝaj laboruloj, popola intelektularo.

Nature, la malamikoj vidas en lia persono fidelan funkciulon de la komunista movado kaj strebas deflankigi lin de la revolucia agado. Ofte la polico traserĉas lian domon, oni portas lin en la policon, kie li estas subigata al peniga pridemandado, oni minacas lin per fizika neniigo.

Malgraŭ sia grandega okupiteco, Trifon Ĥristovski trovas tempon kaj fortojn por verki akrajn publicistajn librojn kaj broŝurojn. Per prunteprenita mono li sukcesas eldoni la verkitajn de li du broŝurojn: „La morto de Ĥristo Botev“ kaj „Problemoj de la vilaĝo“. En tiuj broŝuroj li traktas tre aktualajn demandojn de socia kaj soci-ekonomia karaktero. Ili altiras la atenton de la publiko kaj trovas pozitivan resonon en la perioda gazetaro.

Krome, laŭ leteroj kaj aliaj materialoj, per kiuj lin provizis liaj amikoj-esperantistoj el Ĉinio, li verkis la libron „La milito en la Malproksima Oriento“, sed la faŝista cenzuro malpermesis ĝian publikigon.

En la Muzeo de la Revolucia Movado en Sofio estas konservataj ĉirkaŭ mil leteroj de Ĥristovski, kiujn nun oni prilaboras kaj tradukas bulgarlingve. En GDR jam estas kompilata broŝuro enhavanta leterojn de Trifon Ĥristovski al germanaj laboristoj-esperantistoj.

Plej interesa por la legantoj estas la libro „Mia vivo“, kiun Ĥristovski verkis tiel, en konkuro kun la morto — li mortis nur du semajnojn post ĝia finverko. Ĝi rakontas pri lia martira vivo (paralizo de ambaŭ gamboj kaj dekstra brako ekde sesmonata aĝo), pri lia idea elkresko kaj soci-utila agado.

Ĉio ĉi estas transdonita per la plumo de publicisto, kiu de proksime konas la senĝojan vivon de la laborhomoj, de la malriĉaj vilaĝanoj, kiuj estas lia propra medio.

Trifon Ĥristovski mortis kun okuloj malfermitaj al la nova alvenanta mondo. Sed lia faro kaj la faro de kelkaj generacioj de bulgaraj revoluciuloj-komunistoj estas viva kaj senmorta.

NIKOLA ALEKSIEV

(El la parolado en la solena kunveno en Botevgrad)

La jubileo en la bulgaraj amaskomunikiloj

La bulgaraj amaskomunikiloj vaste respegulis la jubileon de la bulgara Ostrovskij. Ĵurnalo „Botevgradski Plamāk“ (Botevgrada Flamo) dediĉis al Trifon Ĥristovski sian tutan numeron de 19-a de januaro 1985. Abunde ilustrita, la numero estas tre riĉenhava. La temo estas ĉiufanke prezentita. Estas publikigitaj leteroj de Ĥristovski, leteroj de liaj korespondantoj — landaj kaj eksterlandaj. Ne mankas ankaŭ ĵurnalistaj materialoj de Ĥristovski mem, publikigitaj siatempe en diversaj periodaĵoj. En la jubilea numero de „Botevgradski Plamāk“ aperis ankaŭ rememoroj pri ilia amiko Ĥristovski de Nikola Aleksiev kaj Jordan Jotov — ĉefredaktoro de ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (Laborista Faro). Pri la vivo kaj agado de Ĥristovski skribis la unua sekretariō de la komunuma komitato de BKP en Botevgrad d-ro Dimitār Vasilev.

La 23-an de januaro j. k. matene Radio Sofio, programo „Horizonto“ dediĉis al Ĥristovski specialan elsendon en sia rubriko „Faroj kaj dokumentoj“.

La 24-an de januaro ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ publikigis la artikolon de Nikola Aleksiev „Neordinara komunisto“ kaj ĵurnalo „Kooperativno Selo“ (Kooperativa Vilaĝo) donis lokon al la publikaĵo „Vivo egala al heroaĵo“ de Maria Veliĉkova (nevino de Vesa Miĥajlova — flegistino, amikino kaj helpantino de Tr. Ĥristovski).

La 28-an de januaro aperigis grandan artikolon „Monda homo“ de Ivan Ganev la organo de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj — gazeto „Pogled“ (Rigardo).

En gazeto „Televizia-Radio“ (Televideo-Ra-



Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de BEA, enmanigas E-standardon al Mitrofan Veleŭ, prezidanto de E-societo „Trifon Ĥristovski“ — Botevgrad.

dio) Ivan Gunĉev — redaktoro de la filmo „Trifon Ĥristovski“, skribis la interesan kaj sentoplenan publikaĵon „La venko apartenas al la nevenkebla“.

La dokumentan filmon pri Ĥristovski Bulgara Televideo emisiis dimanĉe — la 27-an de januaro.

Dank'al la riĉenhava informado fare de la bulgaraj amaskomunikiloj en diversaj medioj oni eksciis pri la rimarkinda vivo de la fidela komunisto, talenta ĵurnalista, pasia esperantisto kaj granda homo kun fera volo — Trifon Ĥristovski.

Tiu resono de la jubileo en la amaskomunikiloj en certa grado estas ŝuldata al la amase vizitita preskonferenco, gvidata persone de la prezidanto de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj Veselin Josifov.

Maria JANKOVA



Partoprenintoj en la solena festo en Botevgrad.

Fotoj: LADA MILKOVA

VIVO-MODELO

„... Lia malfacila vivo, markita de gravega malsano, lia laboro kaj lia fideleco al la helaj idealoj de l'komunismo prezentas linkiel elstaran organizanton, polemikiston, publiciston kaj kuraĝan batalanton. Ĉiu, kiu estas traleginta la romanon pri lia vivo, la broŝurojn, artikolojn kaj leterojn, verkitajn de li, estas ravita de lia homa aŭdaco, de la majesteco kaj pureco de lia spirito. Por li plene konvenas la vortoj de Cicerono: „Vireco estas aŭdaco“. La kuraĝo de Trifon Ĥristovski estas la plejkaraktara trajto de lia animo, de lia spirito“.

D-ro DIMITAR VASILEV,
unua sekretario de la Komunuma
Komitato de BKP — Botevgrad

„... La vivo de Trifon Ĥristovski estas modelo kaj edifo por la novaj generacioj, por ni ĉiuj. Lia ekzemplo inspiras nin optimisme kaj impete konstrui la novan vivon en nia lando, batali por la feliĉo de nia popolo, por mondpaco“.

ASEN GRIGOROV,
poeto, E-veterano

„Traleginte la libron de Ĥristovski „Mia vivo“, mi detale informiĝis pri lia nekredeble granda kuraĝo vivi malgraŭ la terura malsano, pri kio li neniam menciis en siaj leteroj al mi... Se mi tion sciis, eble mi povintus helpi finance al li!... Nur en Varna, dum la UK de Esperanto, mi eksciis pri lia morto kaj mi profunde suferis...“

La filmo pri Trifon Ĥristovski estas nova pruvo, ke la komunista registaro montras al la gejunuloj imitinde dignajn personojn kiel Ĥristovski“.

JEAN LEZAN,
Francio

„...Koran dankon pro la senditaj poŝtmarkoj kaj pro la tradukita grotesko, kiu estas tre bona, speciale la parto, rilatanta Chamberlaine, ĉirkaŭiranta la grupeton — „Jes — ne, paco — milito, jes — ne...“ Mi legis ĝin laŭvoĉe al miaj kursanoj kaj ili multe ridis. Mi sendis ĝin al la redaktoro de „Ruĝa Esperantisto“ kaj de tie ĝi ĉirkaŭiros la mondon...“

„...Mi ricevis la numeron de la ĵurnalo kun esperanta paĝo, en kiu estas publikigitaj miaj artikoloj. Mi ege ĝojas konstati, ke miaj amikoj en via lando tiel alte aprezas mian laboron...“

„...Ni rememoru la vortojn de Rosa Luxemburg: „La kapitalistoj preferus allasi siajn landojn en fumantaj ruinoj, ol libervole cedi siajn propraĵojn kaj bienojn al la laboristoj“. Mi kredigas, ke mi mem ne malpli subtakas la faŝisman diktaturon...“

KLAYTON, angla laboristo
(El liaj leteroj al Tr. Ĥristovski)

Majesteco de homa spirito

(Dokumenta televida filmo pri Trifon Ĥristovski)

La libro „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski famigis la nomon de tiu eksterordinara homo ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj dank' al ĝia Esperanto-eldono. Pri la personeco kaj la vivo de Ĥristovski ekinteresiĝis bulgaraj filmistoj.

La filmo vekis intereson en ĉiuj sociaj medioj — ĝi prezentis gravajn momentojn el la vivo de la talenta publicisto, aktiva sociaganto, komunisto kaj esperantisto Trifon Ĥristovski.

La scenaristo Valentina Genkova kaj la reĝisoro Vladimir Sorokin faris grandan esplorlaboron, trastudinte milojn da dokumentaj materialoj — leteroj, publikaĵoj, fotoj, libroj ligitaj kun la vivo kaj aktivado de Ĥristovski. Multe helpis ilin kunlaborantoj el la Muzeo de la Revolucia Movado en Sofio, parencoj kaj intimaj amikoj de Ĥristovski — prof. Jordan Jotov, la publicistoj kaj E-veteranoj Nikola Aleksiev kaj Ivan Keremidĉiev, k. a.

...Simpla popolmelodio de okarino akompanas nin laŭ la stratetoj de vilaĝo Radotina (regiono de Botevgrad) al la gepatra domo de Trifon Ĥristovski, dronanta en verdaĵo kaj floroj.

Sur la ekrano aperas gazetoj, ĵurnaloj, libroj, leteroj, fotoj — dekoj, centoj da materialoj, kiuj atestas pri la granda, obstina laboro de la kaduka junulo por lia memklerigo; montras lian ampleksan korespondadon kun amikoj el Bulgario kaj el multaj fremdaj landoj — bulgarlingve kaj Esperante, dank'al kiuj li verkas siajn artikolojn por bulgaraj kaj eksterlandaj periodaĵoj.

Antaŭ ni ekstaras talenta publicisto kun majstre brila stilo, klera ekonomiisto, literatura kritikisto kaj verkisto, vera sociaganto kaj komunisto — sekretario de la partia organizaĵo en lia naskiĝvilaĝo Radotina, imitinda modelo por la gejunuloj-komsomolanoj en Botevgrad-distrikto.

Sur la ekrano parolas prof. Jotov, N. Aleksiev, Iv. Keremidĉiev, Dimitar Ĥristovski (frato de Trifon); oni aŭskultas ankaŭ la rememorojn de amikoj kaj korespondantoj de Ĥristovski el Francio, Britio, Pollando, kies rakontoj kompletigas la portreton de tiu giganto de la homa spirito.

Estas ĝojiga fakto, ke la bulgaraj filmistoj montras viglan interesigon pri la Esperantomovado enlande kaj tutmonde. Rezulto de tio estas la filmo „Trifon Ĥristovski“, produktita de Bulgara Televido. Ĝi nepre kontribuos por popularigo de la personeco, vivo kaj agado de Trifon Ĥristovski inter la spektantoj en Bulgario kaj eksterlande.

DONĈO ĤITROV

LA CIRKULERO DE LA AMERIKA FILOLOGIA SOCIETO DE 1888

En la jaro 1887 estis organizita komitato de membroj de la *American Philosophical Society* (Amerika Filozofia Societo — AFS) en Filadelfio, Usono, kies tasko estis esplori la demandon pri la kreo de internacia lingvo. La tri membroj de la komitato estis Henry Phillips, filo¹, filologo kaj numismato, David G. Brinton, etnologo kaj lingvisto, kaj Monroe Snyder. La tri kleruloj komencis analizi jam publikigitajn lingvoprojektojn kaj taksis ilin en raportoj eldonitaj de AFS. La unua lingvo, kiu estis profunde ekzamenita, estis Volapuko, kiu estis plurflanke kritikita de la komitatanoj.

En januaro 1888 AFS ricevis ekzempleron de la franca traduko de la „Unua Libro“ de d-ro Esperanto, eldonita en novembro 1887. Tiu ĉi verko ricevis favoran traktadon, ĉar la komitatanoj rimarkis, ke d-ro Zamenhof donis al sia lingvo plurajn trajtojn, kiuj koincidis kun la planlingvaj principoj formulitaj de la usonaj lingvistoj sendepende de aliaj projektoj.

Solvenda enigmo por historiistoj de la Esperanto-movado estas jena: kiel Zamenhof informiĝis jam en 1887 pri la okupiĝo de AFS pri internaciaj lingvoj?

En la arkivejo de AFS troviĝas cirkulero datita la 12-an de marto 1888, temanta pri la kreo de internacia lingvo. La dokumento estas en la formo de presita letero subskribita de Frederick Fraley, la tiama prezidanto de AFS. Jen mia esperantigo de la angla teksto.

**Aŭlo de la Amerika Filozofia Societo
Filadelfio, la 12-an de marto 1888**

Ĉe kunveno de la Societo, okazinta en Filadelfio la 6-an de januaro 1888, la sekva rezolucio estis akceptita:

Estis decidite, ke la Prezidanto de la Amerika Filozofia Societo estu petita adresi leteron al ĉiuj klerulaj organizaĵoj, kun kiuj tiu ĉi Societo havas oficialajn interrilatojn, kaj al tiaj aliaj societoj kaj individuoj, kiujn li opinias taŭgaj, por peti ilian kunlaboron perfektigi lingvon por kleraj kaj komercaj celoj, bazitan sur la arja vortprovizo kaj gramatiko en iliaj plej simplaj formoj; kaj por proponi tiu-

cele Internacian Kongreson, kies unua kunveno estu aranĝita en Londono aŭ Parizo.

Konforme al tio, mi nun havas la honoron transdoni ĝin por via konsidero, kaj inviti vian kunlaboron por efektiviĝi la celon, al kiu ĝi rilatas. Por ke la vidpunktoj de nia Societo, kiuj kondukis al la adopto de la rezolucio, estu komprenitaj, mi akiris la permeson sendi ĉi-kune ekzemplerojn de la Raportoj de la Speciala Komitato, al kiu la temo de plano por universala lingvo estis direktita fare de la Societo.

Vi konstato, ke la rezolucio de la Societo ne konformas ĝislime kun tio konsilita de la komitato, sed la temo havas tiel vastan intereson, ke ĝi estas altgrade inda je la plej ampleksa ekzameno. Mi, do, petas por ĝi vian baldaŭan kaj favoran konsideron, kaj petas, ke via decido estu komunikita al mi, kaj, se favora, ĉu vi preferas la aranĝon de la konferenco en Londono aŭ Parizo, kaj ankaŭ indiku la nombron de delegitoj, kiujn ĉiu societo sendu.

Post ricevo de decidoj de la diversaj organizaĵoj, kun kiuj ni korespondas, mi kunvokos la konferencon.

Tre respektplene via,
(subskribita) **FRED. FRALEY,**
Prezidanto

Tiu estas la fama cirkulero de AFS menciita en historioj de Esperanto kaj la internacilingva movado. Postaj eventoj montris, ke la meritplena entrepreno de AFS estis antaŭtempa kaj iom tro optimisma.

Zamenhof detale informiĝis pri la projektit kongreso, ĉar la 10-an de aprilo 1888 li skribis al Henry Phillips, dankante lin pro la raporto pri Volapuko kaj donante sian plenan konsenton al la Kongreso rilate la faradon de ŝanĝoj en Esperanto. La aŭtoro de Esperanto mencias la cirkuleron de Prezidanto Fraley en la „Aldono“ de la **Dua Libro de l' Lingvo Internacia**. Denove estiĝas demando: kiel Zamenhof eksciis pri la enhavo de la cirkulero de Prezidanto Fraley? Ĉu Phillips, kiel sekretario de AFS, sendis ĝin persone al li, aŭ ĉu iu klerulo en Varsovio, eble ĉe la universitato, atentigis Zamenhof pri la alvoko?

La dua suplementa raporto de la komitato de AFS, prezentita en decembro 1888 kaj eldonita en januaro de la sekva jaro, sciigis inter aliaj aferoj, ke pro manko de amasa

(1) Por biografiaj informoj pri Henry Phillips, vidu mian artikolon „Henry Phillips, Jr. (1838—1895) — la unua esperantisto en Ameriko“, *Israela Esperantisto*, 1980, n-ro 71, aprilo, p. 4—6.

subteno, la kongreso ne povas efektiviĝi. Zamenhof jam antaŭvidis tion en la „Aldono“ de la **Dua Libro** (1888), kaj li klarigis en **La Esperantisto** en 1889, ke la fiaskinta kongresa kunvoko rezultis de la indiferenteco de instruistuloj.

Povas esti providence, ke la kongreso de AFS ne okazis. La interesiĝo pri internacia lingvo ĉe tiamaj klerulaj organizaĵoj estis tro malvasta, kaj la tempo ankoraŭ ne estis matura

por decidi pri tiel grava afero en kongreso. Plej verŝajne la tiutempaj delegitoj estus farintaj tiom da ŝanĝoj en Esperanto, ke ĝi apenaŭ estus povinta ĝisvivi. Se la esperantistoj ne havis okazon kandidatiĝi sian lingvon en tiu neokazinta kongreso de la 1880-aj jaroj, ili ne bedaŭru tion, ĉar ili ankoraŭ havas sian lingvon hodiaŭ.

BERNARD GOLDEN

BALKANAJ BELARTAJ KONKURSOJ

(Sub la aŭspicio de Balkana Esperantista Kunordiga Komitato)

La celo de la Balkanaj Belartaj Konkursoj (BBK) estas instigi al verkado la balkanajn esperantistojn kaj evoluigi ties kreokapablojn, por ke ankaŭ la Esperanta arto servu la noblajn ideojn pri amikeco inter la balkanaj popoloj, pri paco sur la Balkanoj kaj en la tuta mondo. La rezultoj de BBK estas anoncataj en la kongresoj de la balkanaj esperantistoj.

La unuaj BBK'85 estas dediĉitaj al la 40-jara jubileo de la venko super faŝismo kaj la fino de la Dua Mondmilito; same al la Jaro de Junularo, proklamita de UN. Do, tio estas ankaŭ la temoj, kiujn devas tuŝi la partoprenantoj en BBK.

BRANĈOJ: 1. Originala kaj traduka prozo. 2. Originala kaj traduka poezio. 3. Teksto kaj muziko de kantoj. 4. Fotoarto.

En BBK rajtas partopreni ĉiu esperantisto el Bulgario, Grekio, Jugoslavio, Rumanio, Turkio kaj Albanio. Estos donitaj po tri premioj en ĉiu branĉo. La premiojn fiksis speciala balkana Esperanta juĝkomisiono kaj ĉiu balkana Esperanto-Asocio pagos la sumojn al siaj premiitaj samlandanoj.

La prozaĵoj ne estu pli longaj ol 6—7 paĝoj (po 30 linioj). Oni nepre sendu ankaŭ la originalon de la tradukita verko. La kantoj estu ne tre komplikaj, prefere por du voĉoj, kun akompano de akordiono aŭ piano.

BBK estas anonimaj. La konkursaĵojn oni sendu en 5 ekzempleroj, subskribitaj per pseŭdonimo, en granda koverto, ĉiam rekomendite. En malgranda koverto enmetita estu skribita la nomo kaj adreso de la aŭtoro. Ĉiu rajtas partopreni en ĉiu branĉo nur per 3 originalaj kaj per 3 tradukitaj verkoj aŭ per 5 fotoj (ĉiu foto en 5 ekz). El ĉiuj senditaj fotoj estos aranĝita ekspozicio enkadre de la III Kongreso de Balkanaj Esperantistoj.

Lasta limtempo por sendi la konkursaĵojn: la 31-a de julio (validas la poŝta stampo); por la fotoj — la 31-a de aŭgusto. Adreso: BALKANA ESPERANTISTA KUNORDIGA KOMITATO, bul. Hristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario.

KONKURSO PRI TRADUKA PROZO

La estraro de Tutlanda Amika Rondo Esperantista (TART) organizas por siaj membroj konkurson pri plej bona traduko de unu el la tri rakontoj de Ĉedomir: „Sâsedî“, „Turisti“, „S obrazovanie“. Ili troviĝas en „Izbrani proizvedenija“, Plovdiv 1971. Kondiĉoj por partopreno:

1. Esti membro de TART dum la unua jarduono de 1985.

2. Havi ne malpli ol 5 tradukojn, korektitajn de la redaktoro kun aritma (meza) pritakso almenaŭ „bona“.

3. La konkursaĵo devas esti sendita al la prezidanto de TART (adreso de BEA) ĝis la 20-a de majo j. k.

Rimarkigo: ĉe kalkulo de la aritma pritakso, la tradukoj kun 30 bazaj erarunuoj estas pritaksataj per tri, pli ol 30 — 2.

Estos disdonitaj ses premioj (se estos tradukoj sur la necesa nivelo) kaj kuraĝigaj distingoj.

La estraro de TART sin turnas al ĉiuj membroj kun peto partopreni la konkurson. Bonvolu ĝustatempe sendi la konkursaĵojn.

FILOLOGOJ, ORGANIZIGU!

La estraro de la Filologa Sekcio ĉe BEA faris akceligan agadplanon por la periodo ĝis la landa kongreso, kiun ni publikigas aparte. Ĝia jarkunveno okazos en la kadro de la kongreso, pri kio ni sciigos detalojn en proksima estonteco. Por havi pli intiman kontakton kaj organizi pli bone la kunvenon la estraro decidis fari adresaron de la landa membraro. Tiucele ni petas ĉiujn diplomitajn filologojn sendi la jenajn informojn: nomo kaj kompleta adreso, jaro de filologia diplomigo, praktikata profesio, naskiĝdato.

Kiuj deziras esti membroj de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj (IUEF) petu aliĝilon kaj statuton de ĝia sekretario-kasisto: **Marin Băcev, 1000 Sofio, PK 1054** (al li oni povas sendi ankaŭ la informojn).

UEA- kaj TEJO-kongresoj en 1985



70-a Universala Kongreso de Esperanto Augsburgo (FRGermanio), 3-10. VIII. 1985

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam,
Nederlando

Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg,
FR Germanio.

Loka Kongresa Komitato (LKK)

Pri artaj aranĝoj respondecas s-ro J. Ipfelkofer; la infanan kongreseton prizorgas s-ino I. Hohn; kaj LKK bonvenigas la kunlaboron de la prezidanto de IFEF, s-ro J. Giessner, pri fervojaj aferoj.

Kotizoj

La kotizoj laŭ kategorioj (de la komenco de 1985): kat. 1 (Ne-membro de UEA) — 188 gld; kat. 2 (Individua membro de UEA) — 156 gld; kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) — 125 gld; kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas membro de UEA) — 94 gld. Aliĝiloj estas haveblaj de la supraj adresoj aŭ de landaj perantoj.

La Kongresa Temo

En 1985 la urbo Augsburg festas la dumiljaran jubileon de sia fondiĝo en la romia epoko. Konscia pri tiu grava evento, kiu koincidas kun la UK, la kongresa temo estas: „Antikvo kaj modernio: kion ŝanĝi, kion konservi?“

Internacia Kongresa Universitato (IKU)

La 38-a sesio de IKU okazos en la kadro de la 70-a UK sub la rektoreco de prof. d-ro Helmar FRANK. Adreso de la Komisiono pri IKU: Prof. Bruce Sherwood (sekretario), 252 Engr. Res. Lab., 103 A. Mathews, Urbana, IL 61801, Usono.

Infana Kongreseto

La aliĝkotiĝo por la 22-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) estas fiksita je 190 gld. La aliĝkotiĝo inkluzivas ĉiujn manĝojn, restadon dum unu semajno kaj la tutan programon.

Inter la kondiĉoj estas aparte menciinde, ke la IIK estas rezervita por infanoj 6- ĝis 13-jaraj; infanoj kun nesufiĉa lingvoscio ne estas akcepteblaj.

41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO SCHLOSS ERINGERFELD 22-29.7.1985, F. R. GERMANIO

Loĝado: En moderna konstruaĵo kun tre riĉe ekipitaj 1- kaj 2-litaj ĉambroj.

Kunsidoj: Ili okazos en la klasĉambroj kaj la aŭlo de Eringerfeld (kie troviĝas lernejo por 1000 junuloj)

Programo: 1985 estas proklamita kiel Internacia Junulara Jaro (IJJ). Ankaŭ dum nia IJK ni diskutu la specifajn problemojn de la junularo en la moderna industria socio: Kial tiom multaj junuloj en la materie riĉaj landoj neniel emas integriĝi en la gepatran generacion — la sistemon de konstanta konkurenco? Kial tiom multaj junuloj fariĝas pli kaj pli agresemaĵoj? Kiujn celojn havas la hodiaŭa junularo?

En la centro de Eringerfeld troviĝas impona kastelo de la 16-a jc. La bela naturo ĉirkaŭe invitas vin promeni kaj ripozi en la arbaro. Sed vi povos ankaŭ aktive sporti dum la IJK — por la sporta programo je via dispono estos giganta gimnastikejo kaj certe ankaŭ 25 metrojn longa naĝejo. En nia sporta programo ne dominos konkursoj kaj ludoj unu kontraŭ la alia, sed ludoj sen gajnintoj (kaj malgajnintoj). Kulmino de tiu laborgrupo estos granda sport- kaj ludfestoj kaj nekutimaj sportiloj kaj aktivecoj. Samtage okazos granda komuna migrado tra la arbaro kun pikniko.

Kompreneble ne mankas tradiciaj programejoj kiel interkona, teatra, internacia kaj adiaŭa vesperoj. Specialaĵoj estos rokkoncerto de la Berlina grupo „La Mondanoj“, ekskurso al cementfabriko, kaj certe ankaŭ aliaj programeroj.

Adreso: Germana Esperanto-Junularo, Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1



Vidaĵo el Aŭgsburgo

En la jaro 1985, 11 jarojn post la hamburga UK, denove germana urbo, nome Aŭgsburgo estas loko de la 70-a Universala Kongreso de Esperanto.

En la sama jaro Aŭgsburgo festos la 2000-jaran datrevenon de sia fondiĝo sub la nomo „Augusta Vindelicorum“, ĉefurbo de la romia provinco Raetio.

Ekde la mezepoko ĝis la jaro 1806 Aŭgsburgo estis unu el la famaj germanaj respublikoj kaj en la 16-a jarcento grava centro de kulturo kaj ekonomio en Eŭropo. La famaj pentristoj Hans Holbein — patro kaj filo — naskiĝis kaj vivis ĉi tie.

La nuna Aŭgsburgo, ĉefurbo de la bavara provinco Svabio kun 250 mil loĝantoj, estas ne nur historiĉa loko, sed ankaŭ moderna urbo.

Aŭgsburgo havas longan Esperanto-tradicion. Jam antaŭ pli ol 80 jaroj fondiĝis tie Esperanto-Grupo. En la jaro 1910, kiam la Universala Kongreso okazis en Vaŝingtono, antaŭe en Aŭgsburgo kolektiĝis 300 delegitoj de UEA al ĝenerala kunsido.

La partoprenantoj en la 70-a UK havos okazon konatiĝi kun Bavario, kies ĉefurbo Munkeno distancas nur 60 km-ojn de Aŭgsburgo. La Bavaraj Alpoj atingblas per unuhora aŭtoveturado. La dumkongresaj ekskursoj montras ĉefe sudan Bavarion, la postkongreso en Kronach ebligas viziton de interesaj nordbavaraj urboj kaj krome unutagan ekskurson al la Germana Demokratia Respubliko (GDR), i. a. al kastelo Wartburg.

La anoj de la LKK kore invitas vin al la 70-a Universala Kongreso de Esperanto.

D-ro LUDWIG RÖLL, LKK-prezidanto

INTERESA EKSPERIMENTO

La ideo naskiĝis tute spontane. Ĉe la gekursanoj, finintaj duan gradon en la kurso de Veneta Baleva dum la pasinta semestro aperis la demando: „Kiel ili stabiligos siajn gramatikajn konojn? Kiam ili komencos paroli flue Esperanton? Ĉu ĉion ĉi donos al ili la tria grado“? ... Finfine estis decidite organizi „Parolantan rondon“.

Per decido de la Instrucentro ĉe UE de BEA — Sofio, tiu intera grado ekfunkciis en septembro pasintjara. Sep partoprenantoj tradukas el la bulgara lingvo en Esperanton kaj inverse; verkas kaj rerakontas; parolas pri anticipe elektitaj temoj laŭ plano aŭ diskutas amike pri diversaj problemoj.

La rezulton oni vidos, kiam tiuj kursanoj finos la trian gradon. Tiam oni decidos ĉu „Parolanta rondo“ estas necesa. Sed jam nun estas evidente, ke ĝi estas utila. Jen kion diris ĝia gvidantino:

— Por miaj kursanoj mi ne estas instruistino — ili nur konsultas min kiel homon pli spertan en Esperanto. Niaj lernohoroj ne similas unu la alian. Foje ni uzas „Paŝojn al plena posedo“, aliffoje libere interparolas. Mi al kutimigas ilin liberigi la frazon de necesaj vortoj, sed ne simpligi ĝin ĝis la nivelo de unua grado. La partoprenantoj tradukas ĵurnalajn kaj literaturajn tekstojn. Estonte ni ekzercigos pri gramatikaj, kiujn oni lernos en la tria grado.

Ĉu „Parolanta rondo“ atingos sian celon? Por respondi al tiu demando, ni invitis la ĉefmetodikiston de BEA Marin Băcev:

— La okupoj de „Parolanta rondo“ pasas nur en Esperanto. Dum unu el la okupoj, ekzemple, la instruistino proponis 4—5 facilajn kaj amuzajn legaĵojn, kiujn la kursanoj rerakontis. Tiamaniere ili ekzercis sian aŭdpercepton, kaj poste la vidan — per rakontado laŭ bildetoj pri konata temo (la fabelo „Ruĝa ĉapeto“). Mi supozas, ke la gramatikaj konoj oni stabiligas „en movado“, se estas permesate tiel esprimi sin. Dum la interparolo, se la kursanoj eraras, la instruistino tuj notas la eraron kaj klarigas ĝin, transirante al gramatika teorio. Kiom mi scias, ŝi preparas anticipe la tekstojn, per kiuj la kursanoj ekzercigas pri pli malfacilaj aŭ pli malofte renkontataj gramatikaj. Mi rekomendus al nia juna koleĝino atenti pri la prononcado de iuj el la kursanoj. Por fiksi la atenton de ĉiuj, kiam unu el ili rakontas, bone estus, se la ceteraj havas la taskon atenti, ĉu ilia kolego ne preterlasis diri ion, aŭ ĉu li (ŝi) ne faris gramatikan eraron. Kiam iu okupo estas pli longa, bone estus doni mallongan ripozon — per kantado aŭ ia amuza rakonto. „Parolanta rondo“ estas interesa eksperimento, kaj ni esperas, ke ĝi donos bonajn rezultojn.

MARIA BOJAĜIEVA

Virina partopreno en la E-movado

La bulgarino ne staris flanke de la kultura movado por disvastigo kaj propagandado de la Internacia Lingvo. Tiun aserton oni povas apogi per jenaj ekzemploj:

La instruistino Stefanka Sopova el Kazanlâk, distrikto de Stara Zagora, fariĝis en 1902 membro de la Franca Societo por Propagando de Esperanto.

En la Zamenhofa Adresaro, inter la unuaj E-pioniroj en nia lando oni povas vidi la nomon de Veselina Vangelova el Svištov. Bedaŭrinde, ni nenion plu scias pri ŝi.

En la periodo 1902—1907 en la E-movado de Veliko Târnovo estis nur kelkaj esperantistinoj — instruistinoj, lernantinoj, laboristinoj.

La instruistino Anastasia Marinova el Veliko Târnovo estiĝis arda propagandistino de Esperanto. En 1902 en gazeto „Rondiranto“ ni legas ŝian poresperantan eldiron: „Ĉar la estonto apartenas al la gejunuloj, ni devas strebi al kunlaboro kun ili“.

En 1904 Maria Abaĝieva estis elektita en la kvinpersona estraro de la Bulgara Societo por Propagando de Esperanto, kies iniciatinto Hristo Rjaĥovski eldonadis la gazeton „Trumpetisto“.

Dum la periodo post la Unua Mondmilito en la Esperanto-movado en Veliko Târnovo aktivis multaj virinoj. La X jubilea bulgara Esperanto-kongreso en 1923 en Veliko Târnovo plivigligis la movadon. Ĝi vekis interesiĝon ĉe la lernantinoj en la loka knabina lernejo, kie Esperanton instruis Mara Sâbeva, Anton Pomakov, Vasil Stojanov. En 1925 en la urbon venis la instruisto-pentristo Ivan Valĉanov, kiu dum dek jaroj vigle propagandis Esperanton. Li organizis E-grupon „Verdaj Steletoj“ en la knabina lernejo.

Aktivulinoj en la E-movado estis Penka Popova, Ivanka Derviŝeva, Andoni Marinova, la instruistino Nevena Angelova — ĉiuj progresemaj virinoj. Penka Popova (1904—1976) jam kiel lernantino estis inkviziciata en la policejo. Poste, dum la Blanka teroro¹ ŝi

¹/Blanka teroro— teroro post la frakaso de la Septembra Ribelo 1923. Kontraŭ la blanka teroro en Bulgario protestis multaj progresemaj mondnamaj intelektuloj, inter ili ankaŭ Henry Barbusse, kiu verkis la libron „La Torturistoj“.

estis persekutata pro siaj komunistaj ideoj. „Bulgara Esperantisto“ avertis pri tio la esperantistaron. Sur la paĝoj de nia E-organo troviĝas kelkaj E-tradukoj de Penka Popova.

„Per Esperanto la homoj el diversaj partoj de la mondo povas senpere interparoli“— diris al siaj gekamaradoj la lernantino Ganka Raŝeva (naskita en 1921). Ŝi heroe pereis en kunpuŝiĝo kun policanoj en 1944.

Vela Piskova (naskita en 1889 en Veliko Târnovo) instruis fizikon en la gimnazio de Sumen kaj samtempe Esperanton al gejunuloj. Viktimo de la Blanka teroro, ŝi pereis en 1925 en urbo Ruse.

En vilaĝo Kilifarevo (nun urbo) ekzistis proleta esperanto-grupo „Liberiga Stelo“, kies membro Mariola Sirakova (naskita en 1904), pro partopreno en la Septembra Ribelo 1923 estiĝis eksterleĝa persono. La polico kaptis kaj mortigis ŝin en 1925. En la sama grupo aktivis Kina Dermengieva (1905—1984). Ŝi korespondis tutmonde, gvidis E-kursojn, partoprenis kongresojn. Eĉ ŝia frizorsalono havis ŝildon kun surskribo „Esperanto“. Tie regule kunvenis amikoj de la Internacia Lingvo. En 1936 la litova esperantisto A. Poŝka vizitis ŝin.

Todorka Iv. Genĉeva, edzino de la partia funkciulo Boris Bogdanov, partoprenis la strikon de transportlaboristoj en Gorna Orjaĥovica en 1918. Ŝi vigle aktivis en la Bulgara Komunista Partio — fariĝis kuriero de la eksterleĝa dua kanalo de la partia organo „Rabotniĉeski Vestnik“. Krome, de 1922 ĝis 1931 ŝi membris en la laborista E-grupo ĉe stacidomo Gorna Orjaĥovica.

Smaragda Nojarova (1880—1932) — dentistino en Sofio, testamentis sian domon (je kosto de 100 000 levoj) por utilo de la bulgara E-movado, kaj la instruistino Maria Zlatareva (1898—1981) lasis sian tutan havaĵon por la prospero de la E-movado en ŝia naskiĝurpo Svištov.

Sekvante la ekzemplon de ĉiuj ĉi indaj kaj meritoplenaj agantinoj, ankaŭ nuntempe la virinoj-esperantistinoj en la distrikto de Veliko Târnovo plu aktivis en nia movado.

OLGA CANKOVA





NEVENA NEDELČEVA

GUTETO DA AMO

Mi iras sur la stratoj rapidante. Estas malvarme, neĝas. Sed ĝi ne estas la grandiloka, mola neĝo, kiu varmigas la teron, ĝojigas la koron kaj karesas la okulojn. Ĝi falas per etaj neĝeroj, kvazaŭ apartaj partetoj de la aero glaciĝus, kaj frosta vento ilin disportas.

La homoj, kiujn mi renkontas, same rapidas, levinte la kolumojn de siaj paltoj.

„Belaĵo estas la vintro“, mi pensas, „se ĝi ne estus tiel malvarma“ — kaj apenaŭ mi ne kunpuŝiĝas kun eta virino, portanta bebon, sed tiel pakitan, ke ŝi ĉirkaŭprenas ĝin per ambaŭ manoj, por ne ellasi ĝin. Aŭdiĝas la sindorlota ploro de la bebo el sub la lankovrilo, kaj la patrino balancetas ĝin kaj ĝin kvietigas tenere.

Mi haltas, alrigardas ŝin kaj pensas: kio igas tiun ĉi virinon porti la malgrandan homon en siaj brakoj?

— Kio povas igi ŝin, — respondas iu voĉo en mi, — ja ŝi estas patrino.

— Kio fakte estas patrino? — mi plu demandas min.

— Estaĵo, kiu amas — sonas la respondo.

Mi ridetas kaj rigardas la virinon tra la neĝeroj. Ŝi balancetas la grandan pakaĵon kaj el ĝi ĉiam ankoraŭ aŭdiĝas la silentiĝanta dordlotema ploro de la bebo.

La virino jetas al mi mirplenan rigardon, poste, pensante, ke mia rideto rilatas al la bebo, ŝi diras.

— Ĝi estas malsata, tial ploras.

Mi facile kapjesas, preterpasas kaj pensas: „Kiom saĝa estas la naturo! Ĝi nur metas guteton da amo en la koron de l'homo! Kaj tiu ĉi guteto faras miraklojn — la patrino zorgas tage kaj nokte pri sia infano, nutras ĝin per sia karno, estas preta oferi ĉion, eĉ sian vivon por ĝi, kaj tio donas ĝojon al ŝi.

Mi entramiĝis, sed la penso pri la guteto da amo ne forlasis min kaj mi pensis: se la naturo volas krei muzikiston, ĝi metas en lian bruston guteton da amo al la muziko. Se ĝi volas krei homon de la scienco, ĝi metas en li

guteton da amo al la scienco. Se ĝi deziras krei heroon, grandan homon, ĝi metas en lian koron amon al sia patrolando, al la socio, al la homaro.

Jes, la saĝa naturo faras la minimumon — ĝi metas guteton da amo en la koron de l'homo. Kaj ĉio cetera estiĝas per si mem.

Tiel enpensinte, mi ne rimarkis kiel mi preterpasis mian haltejon kaj kiam mi elrigardis tra la trueto, farita per ungo inter la glaciaj floroj sur la vitro, mi tuj stariĝis kaj ekrapidis. Bone, ke ne estis multe da homoj kaj la bonkora tramkondukisto atendis ke mi eltramigu.

Denove renkontis min glacia vento kaj neĝeroj. Sed la penso pri la guteto da amo ĝojigis min, kaj mi volis diri al la malvarmo kaj al la frosta vento, ke ili ne estas tiel teruraj, ĉar la naturo povas ankaŭ en ilin enmeti guteton da amo kaj tiam la glacia vento aliiĝos en varman alblovon, la neĝeroj — en gu-



tetojn da roso, kaj la vintro — en printemon.

Mi atingis la aŭtobusan haltejon, ne sentante tiel forte la malvarmon. Tie iu frostiĝinta amikino, frapetante la ŝuojn unu kontraŭ la alia por varmigi la piedojn, salutis min kaj demandis:

— Ĉu ne estas malvarme al vi? Viaj okuloj ridetas. Pri kio vi pensas, kial vi estas tiel gaja?

— Pri io tre-tre eta — mi respondis — pri la guteto da amo, kiun la naturo metas en la koron de l'homo.

— Ho, — ŝi ekkriis — kiel vi povas pensi pri tiaj aĵoj en tia malvarmo?

Mi nur ridetis. Vere mi ne sentis malvarmon! . . .

MARIA P. ANGELOVA

ĈU ESTOS VERE?...

Kial floras en printempo
la plej ĉarmaj belaj floroj?
Kial ridas la infanoj
tiel gajaj kaj senzorgaj?
Kial niaj koroj batas
kiel dum la junaj jaroj?

Ho! Printempo, mi ne volas
plu aŭskulti la eksplikojn
scienculajn. Mi min jetos
en la ondojn viajn varmajn
kiel iam. Miaj tagoj
eble jam finiĝas. . .

„POLA ESPERANTISTO“ GASTAS AL NI

JULIA PIÓRO

POEMOJ MALKVIETAJ

Eksusuris plenskribitaj folioj
en sekreta tirkesto —
ekĝemis elreviĝintaj
animoj de poemoj —
kion vi postulas, kompatindaj,
por akiri ĉielon?
Perfektecon, plenton?

Mi scias, ne ĉion mi bone
kreis
kaj modelo perfekta
senĉese antaŭ mi fuĝas;
nur en suna regno,
kaj tion mi scias certe,
nur en matena juneco de suno
estas mia espero —

mi metos plenskribitajn paĝojn
antaŭ okuloj de flamanta dio,
kaj eliros el ili animo sentema,
kiu konas nek ĉagrenon, nek dubon —

sur ĉasta paĝo de papero
reflektos eterne juna lumo
la plej suprajn flugojn,
ardon, ekstazon, afekcion,
ventros vitralon fajrecan. . .

LIDIA LIGEZA

PARENCECO

Mi pensas pri vi
ofte kaj senteme
mia frato,

precipe kiam kara homo
denove agis ne tiel noble
kiel mi povis esperi.

Kiam oni priridis
mian esencan strebon,

kiam la malamiko
posedas ĉion krom cerbo.

Dulcinea estis ordinara stalservistino,
dika prudentulo de azenaltaĵo
primokadis ĉion kio netipa,
vin ankaŭ,
ventmuelilo senpense plenumis

ordonojn de blovanta vento.

Sed vi scipovis ekvidi
belan damon de modela konduto,
veran, kvankam senceremonian amikon,
malamikon minacan,
sed kun kiu
oni povas batali rekte kaj honeste.

Granda estas kreopova potenco
de la memtrompa imago,
ĝi senkulpigas stultan amon,
helpas vivi,
montras esperon spite al realo.

Mi pensas pri vi ofte kaj senteme,
ĉar vi pravas,
mia frato Donkiĥoto!

HALINA KUROPATNICKA-SALAMON

RIVERO ODRŮ

Verdaj bordoj, blua akvo, dancanta zefiro.
Ĵetu monon en riveron kun propra sopiro.
Venos tagoj kaj monatoj, eĉ jaroj foriros.
Sed konstante Vi al Odro, al Vroclav sopiros.
Rememoru, ne forgesu adiaŭan ploron.
Ĉu moneron Vi dronigis? Eble nure koron?

MARIA P. ANGELOVA

ATENDATA LETERO

En mia mano kuŝas
letero atendata —
tiel konata skribo,
koverto eĉ konata.

Subite malaperas
la griza tago vintra —
estiĝas ĝi helbrila.

La nigraj branĉoj, nudaj
al mi gracie balanciĝas.

Pro ĝojo la okuloj
per larmoj eĉ pleniĝas.

Ĝi estas ordinara
letero blanka, simpla
sed atendata ĉiam.

El koro mi deziras,
ke vi ricevu tian.

FORIRIS SI EN ETERNECON

Omaĝe al INDIRA GANDI

En ŝtormoplana, senkompata tempo vivas ni.
Sur ĉiu paŝo jam embuskis mortminaco.
Tamen kuraĝe sian torĉon portis ŝi, —
brunhaŭta nobla ĉi Anĝelo de la Paco.

Indira Gandhi, hom' — profeto helanima,
filin' de Prometeo, firma kaj bonkora,
viziis ŝi pri la estonta tempo ora,
kiam en mondo regos Bel' kaj Bon' senlima.
(Sed ĉirkaŭ ŝi fanatikuloj furiozis,
kaŝe favoran nur minuton atendante).

Kaj spite al interna voĉ' de l'antaŭsento
eĉ por minut' ne pensis ŝi pri la singardo,
ĉar nestis en ĉi brust' de batalant'
temperamento,
en ŝia mano flirtis de l'progres' standardo.
Ŝi plue luktis kontraŭ nigraj fortoj de l'obsкуро,

revante pri sunplena, harmonia homfuturo.

Ho, kia monstro sangavida, kruda
en tag' fatala kriman manon levis
je la filino granda de la Ter'?
En tiu tago terurtremis la planedo,
kiam ŝi iĝis de la morto predo,
la koro nobla ĉesis sian baton,
okuloj saĝaj estingiĝis en sufer'...

La ĉefa libro de Indira — „Mia Vero“ —
estas la himno al la mondo senmilita,
sen humiligo, premo kaj mizero,
(la tutan vivon ŝi dediĉis al ĉi celo,
luktante por Justec', Progreso, Belo).
Ĝi estu sankta testamento por Homaro,
rimedo sola kontraŭ la nuklea ve-koŝmaro!

Kievo, USSR, novembro 1984

nia intervjuo

AKTORINO KAJ ESPERANTISTINO

Antaŭ la Internacia Virina Tago — 8-a de Marto, reprezentantino de la redakcio — JÜLIETA MANEVA, vizitis nian elstaran E-aktivulinon Belka Beleva — aktorino kaj lektorino pri sceneja parolo en la Supera Instituto de Teatroarto.

— *S-ino Beleva, Vi dediĉis Vian vivon al la teatro kaj al la E-movado. Kion donis ili al Vi — virino-kreanto kaj sociagantino?*

— La aktora arto estas ĉarma, forte efikanta arto, kiu ebligas plenan sinmanifestiĝon. Kiel aktorino mi interpretis la rolojn de virinoj diverskarakteraj el diversaj epokoj. Tio sendube donas unikajn travivaĵojn, spiritan leviĝon, kio estas por mi fonto de ĝojo. En la esperantan medion mi venis antaŭ 27 jaroj. Tiam mi spertiĝadis en la aktorado. Dum ĉiuj ĉi jaroj sur esperanta scenejo, antaŭ esperanta publiko mi plenumis multajn rolojn de virinoj, t. e. mi realiĝis kiel aktorino.

Ne estas facile aktori, des pli se oni parolas ne en sia gepatra lingvo. Tiu aldona malfacilaĵo hardis mian volon, donis al mi novajn kreimpulsojn.

— *Kiel aktorino, al kio vi strebas?*

— La aktoro ludas por la publiko, tial mi ĉiam strebas laŭeble influi sur la spektantojn, kontribui por plialtigo de ilia kulturo kaj estetika kriterio.

— *Cu estas io, per kio la esperanta publiko diferencas de la ordinara publiko?*

— Kompreneble. La esperanta publiko estas multe pli emocia, pli dankema. Eble ĉar ĝi

komprendeblas la malfacilaĵojn, ĉe kiuj ni laboras. Aŭ eble ĉar ĝin, pli ol kiun ajn alian publikon, unuigas komunaj interesoj kaj ideoj.

— *S-ino Beleva, kiel membro de la Virina Komisiono ĉe BEA kiajn taskojn vi havas?*

— En la Virina Komisiono ĉe BEA membras reprezentantinoj de diversaj E-societoj kaj sekcioj en Sofio. Ankaŭ ĉiu distrikto havas ĉe ĝi po unu reprezentantinon-aktivulinon. Nia antaŭstaranta tasko estas noti la 40-jaran jubileon de la venko super faŝista Germanio. Por la celo ni decidis eltrovi informojn pri esperantistinoj, kiuj partoprenis kiel volontuloj la Patrolandan Militon. Kun grupo, organizita de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, ni vizitos la lokojn de la bataloj. Okaze de la jubileo ni salutos partoprenantojn en la milito el aliaj landoj. Ni partoprenos la laboron de la 41-a kongreso de BEA. Krome, antaŭstaras nia raport-elekta jarkunveno. Ni esperas realiĝi kontaktojn kun la Internacia Virina E-Komisiono de UEA por povi raporti pri nia agado lige kun la 100-jariĝo de Esperanto. Laŭ iniciato de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, bulgaraj esperantistoj partoprenos en duflankaj renkontiĝoj kun reprezentantinoj de virinaj E-organizaĵoj en Kubo, Rumanio, Mongolio kaj Francio. Ni preparos landliman renkontiĝon kun virinoj-esperantistinoj el Jugoslavio kaj Rumanio. Krome, ni invitos gastojn ĉe ni bulgarinojn-esperantistinojn, kiuj pere de Esperanto edziniĝis al alilandaj esperantistoj kaj loĝas en alilando.

BRILA TURNEO DE V. DAMJANOV EN KANADO



Veselin Damjanov kaj Wally du Temple (dekstre)

Laŭ invito de la konata kanada esperantisto Wally du Temple, la merita artisto Veselin Damjanov, solisto de la Stata Muzika Teatro „Stefan Makedonski“ en Sofio, dum unu monato sukcese koncertis en Kanado. Li faris kelkajn recitalojn en Vankuvero, Viktorio kaj Montrealo. La unua okazis en la nova vankuvera operteatro „Richmond“. Damjanov kantis ankaŭ en la fama Lester B. Pearson College kaj estis invitita doni koncerton en la granda „Brita Kolumbia Universitato“. La enspezoj de tiu koncerto estis destinitaj por la viktimoj de la malsato en Etiopio.

La kanada gazetaro aperigis flatajn recenzojn pri nia kantartisto. *Jurnalo „Times-Colonist“* donis lokon al artikolo kun tri grandaj fotoj de Damjanov, en kiu oni povas legi: „La gejunuloj el 50 landoj, kiuj studas en Pearson College, entuziasme akceptis la majstran kantadon de la baritono el muzika teatro en Sofio V. Damjanov, kiu kantis en bulgara, franca, rusa, itala, germana, angla, hispana kaj Esperanto. La studentoj tondre aplaŭdis la operajn kaj operetajn ariojn, rusajn popolkantojn, romanojn, kanzonojn kaj kriegis: „Brave! Ankoraŭ!“ *Jurnalo „The Review“* en Viktorio aperigis longan intervjuon kun la kantisto, titolitan „Unu opereta stelo kantas en la lingvo de amikeco kaj paco“. Post konciza biografio noto pri Damjanov oni skribas interalie „La bulgara kantisto entreprenis la turneon en Kanado ne nur por prezenti sian belegan voĉon kaj kantarton, sed ankaŭ por konvinki la publikon, ke Esperanto estas vivanta belsona lingvo, kiu ege taŭgas ne nur por komunikado, sed ankaŭ por muzika kreado

kaj interpretado. Kantante en kelkaj lingvoj, Damjanov donas eblecon al la aŭskultantoj mem konstati kaj ĝui la belsonecon de la Internacia Lingvo, komparante ĝin kun la naciaj lingvoj. 40% el lia repertuaro estas esperantlingva“.

La kanada radio en Vankuvero kaj Montrealo intervjuis france nian artiston kaj samtempe aŭdigis iujn el liaj E-diskoj. Unu recitalo estis elsendita per la televido.

Krome, en Kanado oni produktis aŭd- kaj videokasetojn kun plenumoj de V. Damjanov en Esperanto.

EŬO PRI PUBLIKAĴOJ

„Esperanto de UEA“ — januaro 1985

En sia artikolo „Pri balkana kunlaboro“ Mustafa Resuloviĉ rakontis pri la laboro de la 2-a Balkana Esperanto-Kongreso en Ateno. Sur la fono de historia evoluo de la Balkanoj, la aŭtoro emfazis la objektivajn premisojn por relative rapida disvastiĝo de Esperanto sur la Balkana Duoninsulo.

En la informo „Dokumenta televida filmo“ la ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ Donĉo Hitrov sciigas pri la unua bulgara profesia filmo „Leciono de Esperanto“, dediĉita al la disvastiĝo kaj sukcesoj de la Internacia Lingvo en Bulgario ekde la komencaj jaroj de nia jarcento ĝis nun.

Multjara kinofurnalisto, Donĉo Hitrov recenzis precipe la apogpunktojn de la filmo de Bulgara Televido kaj parolis pri la laŭda publika resonado.

„Internaciisto“

Post sia vizito en Bulgario s-no Franz Schick dediĉis al nia lando kaj E-movado kelkajn publikajojn en n-roj 7—8, 9—10 kaj 11—12/1984 de „Internaciisto“. En artikolo „40 jarojn de socialisma revolucio en Bulgario“ li dividis siajn impresojn pri la sciencpraktika konferenco en Velingrad. En „Kelkaj epizodoj dum nia vojaĝo tra Bulgario“ la aŭtoro esprimis sian admiron pri la heroaĵo de Vela Peeva. Emociaj estis la vizitoj de la aŭstria samideano en historia Batak kaj en la ĉefurbo.

Per la artikolo „La longa kaj dornoplana vojo de l'bulgara popolo“ kolektivo esperantista komunista gratulas bulgaran esperantistaron okaze de la 40-a datreveno de la liberigo de Bulgario el sub faŝismo. Dankon!

Kiel homo, kiu konas Bulgaron, s-no Schick sincere dediĉis al bulgara temo interesajn kaj veramajn materialojn.

60 JAROJN PORESPERANTA AGADO

La 30-an de novembro 1984 vespere en la E-klubejo en Plovdiv okazis solena vespero, dediĉita al la 60-jara aktiva Esperanta kaj traduka agado de la veteranino de nia movado Anka Praĥova.

La iniciato por tiu kunveno estis de la Arta Klubo ĉe DE de BEA en Plovdiv. La prezidanto de la Arta Klubo Atanas Krumov malfermis la solenaĵon kaj prezentis la jubileulinon.

Anka Praĥova estas naskita en 1906 en u. Koprivŝtica. Si estas nepino de partoprenanto en la Aprila Ribelo 1876, pendumita de la turkoj. Anka Praĥova esperantistiĝis en 1923 kaj jam 60 jarojn ŝi estas aktiva membro de societo „Kulturo“. Pro sia multjara kaj aktiva E-agado ŝi estas distingita per la ora insigno de BEA kaj proklamita ĝia honora membro. En 1983 ŝi partoprenis tradukkonkurson organizitan de DE de BEA en Plovdiv kaj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) en Leipzig pri porpacaj materialoj kaj ŝia tradukaĵo estis premiita.

La jubileulino parolis emocie kaj kortuŝe. Ŝia unua instruisto de Esperanto estis Dimităr Malĉev. Jam fine de 1923 ŝi komencis korespondi. Inter ŝiaj unuaj alilandaj korespondantoj estis 21-jara studento el Taŝkento (USSR). En 1924 ŝi unue publikigis sian tradukon el Esperanto kaj por unua fojo vizitis nacian E-kongreson — en Ruse. En 1929 Praĥova partoprenis la internacian E-kongreson en Budapeŝto, kie ŝi konatiĝis kun la filino de Zamenhof Lidia Zamenhof kaj kun Julio Baghy. En 1966 ŝi denove vizitis Budapeŝton, kie havis neforgeseblan renkontiĝon kun sia unua korespondanto, la iama sovena studento el Taŝkento, jam scienca laboristo-pensiulo Kesar Koblov.

Veteranoj-esperantistoj rakontis rememorojn pri ŝi.

Esperanto-poetoj recitis versaĵojn, dediĉitajn al la jubileulino. A. Praĥova legis siajn tradukojn. En la nomo de DE de BEA en Plovdiv ĝia prezidanto Jordan Angelov salutis Anka Praĥova kaj enmanigis al ŝi donacon kun bondeziroj pri firma sano kaj plua aktiva E-agado.

Sekvis pluraj elkoraj bondeziroj de amikoj, samideanoj de la Arta Klubo, de urbaj E-societoj. Al la jubileulino oni donacis multajn florojn. Krome, ŝi ricevis saluttelegramon de DE de BEA en Jambol.

VLADIMIR JELEV

PRO SINDONA AKTIVECO

Pro multjara aktiva agado en la Esperanto-movado kaj lige kun lia 75-jariĝo, la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis Georgi Idakiev el Haskovo per ordeno „Cirilo kaj Metodjo“ — II grado. La kandidato-membro de la Buroo de DK de Bulgara Komunista Partio kaj unua sekretario de DK de Komsomolo Pavel Tjankov enmanigis la ordenon al la E-veterano. Ĉeestis esperantistoj, civitanoj. Estis prezentitaj salutleteroj al la jubileulo de DE de BEA kaj de la E-societo „Prof. Asen Zlatarov“.

Al nia estimata samideano kaj honora prezidanto Georgi Idakiev ni bondeziras pluan aktivecon, sukcesojn kaj feliĉon!

FILATELA EKSPOZICIO EN PETRIĈ

Mi feriis en la bela suna urbo Petriĉ kaj tute hazarde havis la feliĉon ĉeesti la 7-an de septembro 1984 la malfermon de filatela ekspozicio de la loka veterano-esperantisto kaj malnova komunisto Georgi Andreev, dediĉita al nia plej granda festo — la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en nia lando.

La ekspozicio estas impona — tiom multaj belaj kaj interesaj markoj, ke mi ne trovas vortojn por priskribi ilin.

Antaŭ 64 jaroj s-no Andreev, estante 14-jara knabo, komencis kolekti markojn. Li revis konatiĝi kun homoj el diversaj landoj kaj trovis la vojon al sia revo dank' al Esperanto. Preskaŭ tutan vivon (nun s-no Andreev estas 78-jara) li korespondadis kun homoj el ĉiuj kontinentoj. En la leteroj al siaj eksterlandaj korespondantoj li rakontis pri sia socialisma lando kaj ĝia beleco, pri la firma deziro de la bulgara popolo vivi en paco. Per sia agado kamarado Andreev multe kontribuis por kreado de novaj esperantistoj kaj filatelistoj. „Per filatelo kaj Esperanto — por paco kaj amikeco inter la popoloj“ — estas la devizo de lia ekspozicio.

Elkoran dankon kaj bondezirojn al s-no Andreev pro lia laŭdinda kaj tre utila faro! Estus tre bone, se ni havus la eblecon vidi tiun ĉi belegan ekspozicion ankaŭ en Sofio kaj en aliaj urboj!

CVETANKA KOSTOVA

AMUZA MATEMATIKO

En la lastaj tagoj de 1984 la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto aperigis en Esperanto la libron „AMUZA MATEMATIKO POR GELERNANTOJ“, kies aŭtoroj estas la bulgaraj esperantistoj-geedzoj Ljudmila kaj Petko Arnaudov.



En Sofio:

Ĵurnalo „Narodna Mladej“ (25. IX. 1984) donas lokon al la redakcia ĵurnalistino Veronika Blagova pri Internacia Esperanto-Lernejo en v. Pisanica apud Smoljan. La semajna gazeto „Pogled“ (1. X. 1984) publikigis informon pri la proklamo de Kiril Drajev kiel honora membro de UEA pro meritoj al la Esperanta kulturo.

Ĵurnalo „Rabotničesko Delo“ (23. XII. 1984) sub titolo „Esperanto — lingvo de la paco“ aperigis informon de Dimitar Mutuŝev pri esperantista simpozio en Varsovio. En j. „Oteĉestven Front“ (5. XI. 1984) aperis informo pri Semajno pri Bulgario en Svedio, organizita fare de Sveda Esperanto-Federacio kaj de la Internacia Esperanto-Kursejo en Bulgario. La semajna gazeto „Narodna Kultura“ (16. XI. 1984) publikigis leteron al la redakcio de la fervojisto-esperantisto Georgi Litov, en kiu li, surbaze de sia esperanta sperto, parolas pri la kultura rolo de la kolekta hobia (ŝatokupo). La instruista semajna gazeto „Uĉitel'sko Delo“ (21. XI. 1984) donis lokon al artikolo de Olga Cankova pri la pentristo Ivan Vâlcanov, en kiu la aŭtorino rakontas ankaŭ pri lia esperantista agado dum la jaroj, kiam la pentristo oficis kiel instruisto en u. Veliko Târnovo. La kuracista semajna gazeto „Zdraven Front“ (24. XI. 1984) informas pri la IV-a Nacia Konferenco de Medicinistoj-Esperantistoj en Bulgario, kaj „Železniĉarska Tribuna“, faka fervojista ĵurnalo (1. XI. 1984) — pri la nacia konferenco de bulgaraj esperantistaj fervojistoj en u. Gorna Orjahovica. La sama ĵurnalo (5. XII. 1984) donis lokon al informo de Verka Stajner pri fervojistaj E-kursoj en Sofio.

En la provinco:

Ĵurnalo „Naroden Drugar“ — u. Jambol (5. IV. 1984) informis pri la partopreno de lokaj junaj esperantistoj en la Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en u. Plovdiv. La sama ĵurnalo (5. VII. 1984) detale informis pri distrikta E-konferenco, okazinta fine de junio p. j. La uzina j. „Duma na Metalurga“, eldonata en la Uzino por Aluminiuj Ellaboraĵoj — u. Ŝumen (6. VII. 1984) informis per kontribuaĵo de Hristo Iliev pri interesa renkontigo de la uzinaj esperantistoj kun soveta esperantisto el la urbo-heroo Brest.

Ĵurnalo „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (18. IX. 1984) aperigis du priesperantajn materialojn — grandan intervjuon kun d-rino Maria Pontika, kiu gastis en nia lando por lektori dum la Somera Esperanto-Universitato en u. Veliko Târnovo kaj informon pri la tradicia Esperantista Porpaca Konferenco en u. Parĉubice, Ĉeĥoslovakio.

Ĵurnalo „Ŝumenska Zarja“ — u. Ŝumen (17. XI. 1984) detale informas pri gastado de lokaj esperantistoj en u. Magdeburg, GDR, ĝemela al Ŝumen. Pri solenaĵo lige kun la naskiĝdato de L. L. Zamenhof, organizita de la esperantistoj kaj la Distrikta Biblioteko en Ruse informas la loka ĉiutaga ĵurnalo „Dunavska Pravda“ (15. XI. 1984) J. „Naroden Drugar“ — Jambol (27. IX. 1984) informas pri pilgrimo de esperantistoj el Jambol al la naskiĝvilo de la esperantisto-heroo Kolju Tenev, pereinta en batalo kontraŭ la faŝismo. La sama ĵurnalo (15. XI. 1984) detale priskribas la renkontigon de lokaj esperantistoj kun meritplena ekspartizano-batalanto. J. „Septemvri“ — u. Stara Zagora (22. XI. 1984) aperigis grandan artikolon de Petko Bonev pri la Balkana Esperanto-Kongreso en Ateno. J. „Pirinsko Delo“ — Blagoevgrad, en sia monata eldono „Vjara“ (27. X. 1984) informas pri recitalo en Esperanto de la poezio de Nikola Vapcarov, fama poeto-revoluciulo, pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo.

KR. KARUCIN

Jen nia „verda rosmaro“ el urbo Loveĉ Kiril Kalĉev denove salutas nin okaze de la Novjaro 1985 kaj bondeziras al niaj legantoj fortan sanon. Li invitas ilin sekvi lian imitindan ekzemplon — hardi siajn korpojn per sinbano en glacie malvarma akvo.

Ĉu kaprico de strangulo?

Tute nel!

Kune kun la foto Kiril Kalĉev sendis alla redakcio ankaŭ sian broŝureton titolitan „La hardado de la korpo — fonto de sano“. En tiu ĉi broŝuro eldonita en Esperanto la aŭtoro dividas sian propran sperton pri kuracado de grava malsaniĝo (muskola reŭmatismo) rezulte de procedoj per glacie malvarma akvo dum ĉiuj kvar jarsezonoj kaj precipe vintre en la glaciiginta akvo de rivero Osâm, en lia naskiĝurbo.

Esperanto tra la mondo

ROMANO DE ESTONA VERKISTO EN ESPERANTO

En Estonio aperis en Esperanto (Eldonejo „Eesti Raamat“) romano de estona verkisto Mats Traat „Danco ĉirkaŭ lokomotivo“. Ĉefa temo de la romano estas la situacio de la estonaj kamparanoj en la XX jc. La verkon tradukis el la estona lingvo Hillar Saha kaj Henrik Sēppik, redaktis Johannes Palu. La postparolon verkis August Eelmäe. Eldonkvanto 4000 ekzempleroj.

ELMAR RATASSEPP

45-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Gi okazos de la 5-a ĝis la 9-a de julio 1985 en Kartageno. Kongresejo estos la Universitata Restadejo „ALBERTO COLAO“, str. Hno. Pedro Ignacio, sn. Organizanto de la Kongreso — Hispana Esperanto-Federacio, Apartado, 119; 47080 VALLADOLID. Ĉeftemo: „La maro kiel faktoro de komunikado“.

NI KONDOLENCAS

DIMITĀR DENĈEV NE PLU ESTAS INTER NI

La 3-an de januaro 1985 forpasis la konata esperantisto-kantisto Dimitĉar Denĉev, kiu en la lastaj jaroj ofte ĝuigis la esperantistan publikon per sia milda tenora voĉo.

Naskita en 1924 en malriĉa laborista familio en urbo Samokov, Dimitĉar Denĉev finis gimnazion en sia naskiĝurbo. Poste li daŭrigis siajn studojn en la milita aerflota lernejo en urbo Kazanlĉk, post kio li estis oficigita kiel piloto en la aerfloto en Graf-Ignatievo. En la unuaj tagoj post la 9-a de Septembro 1944, kiel piloto, per sia aviadilo „Cajka-43“, li sukcesis plenumi kelkajn gravajn taskojn de la registaro de Patrolanda Fronto — disĵetis revoluciajn flugfoliojn super urbo Plovdiv kaj super la kazerno en urbo Haskovo kaj leteron kun la programo de la distrikta komitato de la partio.

Post la servado en la aerfloto Denĉev studis muzikon kaj laboris kiel tonreĝisoro en Radio Sofio kaj en la Bulgara Televido.

Kiel redaktoro de revuo „Kolektanto“ Denĉev laboris tre sindone, fordonante al tiu laboro sian tutan sperton kaj animon. Sur ĝiaj paĝoj, kaj ankaŭ sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ ne malofte aperadis poeziaĵoj kaj aliaj materialoj de Denĉev. Multaj konas lin kiel tradukiston kaj kursgvidanton.

Kiel komunisto Denĉev estis tre agema kaj principa.

Grava malsano frue forprenis la vivon de Dimitĉar Denĉev.

Ni kliniĝu antaŭ lia memoro!

V. RIZOV

* * *

Ne estas jam inter ni la sindona kaj fervora multjara E-aganto VLADI VĀLĈEV VĀLĈEV el Dimitrovgrad, forpasinta la 31-an de aŭgusto 1984.

Vladi Vālĉev estis instruisto de Esperanto, fondinto kaj unua prezidanto de la loka E-societo.

Ni kliniĝas antaŭ la hela memoro de nia eksprezidanto kaj promesas sindone kiel li labori por la triumfo de Esperanto, de la paco kaj socialismo.

E-societo „G. Dimitrov“,
Dimitrovgrad

ENHAVO

*** Trifon Ĥristovski ĉiam en niaj koroj! . . .	11
D. PAPAŖOV. Al la jubileo—kun novaj sukcesoj! .	2
G. MAERTENS. Konstruu kun ni fortan movadon por Esperanto	2,3
N. ALEKSIEV. Homo kun granda koro	3
M. JANKOVA. La jubileo en la bulgaraj amaskomunikiloj	4
*** Vivo-modelo	5
D. ĤITROV. Majesteco de homa spirito	5
*** Balkanaj belartaj konkursoj	7
*** UEA- kaj TEJO-kongresoj en 1985	8, 9
M. BOJAĜIEVA. Interesa eksperimento	9
O. CANKOVA. Virina partopreno en la E-movado .	10
*** Beletro kaj poezio	11, 12
J. MANEVA. Aktorino kaj esperantistino	13
*** Brila turneo de V. Damjanov	14
*** Enlanda movado	15
*** Esperanto tra la mondo	16
Kr. KARUCIN. Tra la gazetaro	16
M. KANEVA. Martenica	17

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ manskribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La Redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomojn kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondadojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ post du monatoj.

La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

La 19-an de novembro 1984 forpasis

PENKA NIKOLOVA PEEVSKA

80-jara, edzino de la elstara esperantisto prof. d-ro Vasil Peevski. Al li nia esperantistaro esprimas siajn sincerajn kondolencojn.

La Redakcio

GASTIGANTOJ SERĈATAJ!

Estas serĉataj geesperantistoj el Sofio, kiuj havas konvenan loĝejon kaj pretas akcepti eksterlandajn esperantistojn kontraŭ pago.

Tiuj, kiuj deziras kunlabori kun ni, anoncu sin perletere al la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, P. K. 45, 1090—Sofio.

Sur la kovrilpaĝo:
Novaj generacioj.

Foto: Emilia Kirilova

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀĈEV, Vasil BOROVIANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitĉar ĤAĜIEV, Krĉstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario
tel. 31-70-19

P. K. 66


1 000 Sofio

Ŝtata preseo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

MARTENICA

En la bulgara lando estas multaj kutimoj ligitaj kun la jarsezonoj — vintraj, printempaj, someraj, aŭtunaj — ĉiu pli bela ol la ceteraj.

Jen la vintro jam forpasas, alvenas la printempo — buntkolora kaj bela, gaja kaj ridetanta. Kaj kun ĝi venas la tempo de ĉi el la plej vivigaj kaj belaj printempaj kutimoj ĉe la bulgaroj — ornamado per „Martenici“¹. Ili



ne estas aldono al ĉi ŝpeco de rita vesto, kiel ekzemple la kristnaskaj aŭ palmofestaj ornamadoj, sed memstara ornamado destinita por homoj, fruktarboj, por la brutaro.

La nomo „Martenica“ venas de la nomo de monato Marto, kiun en la popolo² oni nomas simple Marta aŭ Avino Marta.

En la mateno de la unua marta tago ĉie regas festa humoro. Frumatene ĉiuj sin ornamas per „Martenici“. Krome, kiel en la delonge pasintaj tempoj, ĉiuj dommastrinoj metas ruĝan ŝtofon aŭ ruĝe kolorigitan lano sur la verandobariiloj, „por ke ne koleriĝu Avino Marta, por ke estu ruĝa la tritiko kaj fruktodona la jaro“.

De kie venas la blanka kaj ruĝa koloroj de la „Martenica“? Iam, en la tago de akuŝhelpo, la avino-akuŝistino ornamis la etajn infanojn per blanka kaj ruĝa kolorigita lano. Kaj en la tuta lando el tiu lano poste oni faris la belajn printempajn „Martenici“, precipe por infanoj — „ke estu sana kaj ruĝvanga la infano, ke maljuniĝu kaj griziĝu“, t. e. la blanka lano simbolas longan vivon, kaj la ruĝa — sanon kaj forton.

Laŭ la popola kutimo la „Martenica“ prevenas de malsanoj ne nur homojn, sed ankaŭ

brutaron, fruktarbojn. Ili estas portantoj de la bono, feliĉo kaj sano en la familio, domo kaj mastrumo. Tial ofte oni povas vidi ilin ankaŭ sur la kortpordoj, sur pordoj de ŝafejoj kaj staloj, sur fruktarboj.

Por la tempo, dum kiu oni sin ornamas per „Martenici“ tre konvenas jena popola saĝo: „Januaro kaj februaro frostmortigas³, Marto senfeligas, Aprilo vendas la felojn“. „Marto senfeligas“ — do tute nature el tio sekvas kaj plej forte evoluas la preventiva signifo de la „Martenica“ — doni sanon kaj forton al ĉiuj.

Laŭ la popola kutimo oni portas la „Martenici“ ĝis kiam oni vidas la unuan hirundon aŭ ciklonion, ĝis kiam oni vidas florantan fruktarbon. Tiam oni alligas ilin al floranta arbo, por ke la infanoj estu blankaj, ruĝvangaj, belaj kaj sanaj.

Jen kiel profunde eniris la vivon de la bulgara popolo tiu simbolo de la printempo — la „Martenica“, kiom da beleco kaj varmo ĝi elradias.


La ornamado per Martenici estas ligita kun la multjarcenta sperto de la popolo. La kutimo ankaŭ nun estas vivipova kaj havas forton por longa vivo kaj florado en la kondiĉoj de nia prosperanta patrolando — ĉiujare en la unua tago de la unua printempa monato sur la brustoj de ĉiuj bulgaroj — infanoj kaj plenkreskuloj, viroj kaj virinoj, ekbrilas per sia blanka-ruĝa beleco nia plej bulgara ornamado — la „Martenica“.

M. KANEVA

¹Martenica — ornamado el torditaj blankaj kaj ruĝaj fadenoj, en ĉiuj landregionoj ankaŭ el diverskoloraj fadenoj — kiel la ĉielarko.

²Temas pri la bulgara popolo.

³Frostmortigas — oni komprenu, ke kaŭzas malsanojn ĉe homoj kaj brutaro.



Desegnaĵoj: R. Dojčinov